

Eŭropa Bulteno

Aŭgusto 2015, Numero 151

LA CENTA UNIVERSALA KONGRESO EN LILLO



La centa UK estis vere nekutima kaj memorinda aranĝo. Universalaj kongresoj havas sian rutinon, sian klaran skemon kiun UEA sekvas jam dum jardekoj. Malgraŭ ĉiuj kritikoj, ŝajne tiu strukturo ankoraŭ kaptas intereson de sufiĉe multaj membroj de UEA kaj garantias sukceson. UEA ankaŭ ĉi-jare faris sian kutiman laboron korekte, organizis la programojn, aliĝojn, ekskursojn kaj tiusence ĝi ne estis aparta manifestaĵo. Sed kio la centan elstarigas estas la speciala engaĝiĝo de francaj esperantistoj, gastiganta E-movado. Sepcento da ili partoprenis en la Kongreso, same multaj kiom da kongresanoj estis en la 99-a UK entute. LKK kaj helpantoj: pli ol 200 personoj. La francoj manifestaciis forton de la sendube plej multnombra kaj organizita nacia movado en la mondo. La nacia vespero estis tre freŝa aranĝo. Komplete ĝin efektivigis la artistoj esperantistoj preskaŭ plenprofeie, evitante klasikajn folkloriĝojn kaj tamen prezentinte bonege la francan kulturon kaj kontribuon de francaj esperantistoj en ĝi. Dediĉinte gravan parton al fama belga franco Jaques Brel ili tiel brile prezentis ties verkon ke eĉ la tradukoj resonis per la elstara funkcio de sono R en ties kantoj.

Eĉ pli ol la rolo de la francoj en la kongresa programo elstaris brila kaj modela malfermeco de ĉi tiu UK. Plej ofte oni ŝparas monon kaj ne multe uzas por reklami E-on ene de la urbo, ne montrante la aranĝon al la civitanoj. Nun estis escepto. Okazis brila prezento de iaspeca koncerto de francaj kantoj en Esperanto sur la placo antaŭ la teatro kie aliĝis multaj hazardaj pasantoj kaj kunkantis. Amase estis ĉie en la urbocentro dismetitaj afiŝoj, la loka gazetaro ĉiutage skribis artikolojn, radio kaj televido interesiĝis kaj elsendis, dank al brila informa servo turnita al la ekstero. Simile brila estis la vizito de esperantistoj al Bulonjo dum Maro dum la ekskursita tago. En la teatro kie okazis la unua kongreso antaŭ 110 jaroj okazis solena konferenceto kun kvarcento da kongresanoj, poste oni solene malfermis novan memortabulon sub la Zamenhof-monumento ĉe la malnova stacidomo post kio la centoj da esperantistoj promenis tra la urbo al la urbestrejo sur stratoj ornamitaj per E-flagoj kaj estis akceptitaj de la urbestro. Brila manifestaĵo publika. La urbo pro tiu okazo decidis fondi Esperanto-centron al kiu oni dediĉis vilaon urbocentre.



Kaj fine al la imponeco de la kongreso kontribuis la 2700 kongresanoj el 80 landoj, kvanto jam de longe ne vilita en UKoj. Pri la centa la E-movado vere povas fieri.

Zlatko Tišljarić

DU IDEOLOGIOJ

La centa UK bonege elustris kiom ideologia estas la E-movado. Ĉiuj paroloj estis plenaj de emocioj kaj alvokoj al la komencoj, al Bulonjo, al Zamenhof, al pacemo. La prezidanto plurfoje asertis ke ni esperantistoj estas apartaj, mirindaj kaj daŭre oni plenŝtopis la orelojn de ĉiuj pri sankteco de nia afero. Zamenhof-nepo simbole transdonis la torĉon de heredo al siaj filinoj... En Bulonja teatro, loko de unua kongreso sonis emociplenaj frazoj, memortabuloj, busto, malnova stacidomo... Kompreneble, ĉio plenis de simboloj: flagoj, himnoj, steloj... La E-movado vivas kaj funkcias pro sia ideologio kaj ĝi estas la interna ideo. La esperantistoj kredas pri sia specifa rolo, kontribui al kreo de iu ideala mondo sen militaj konfliktoj pro tio

ĉar ĉiuj parolos unu lingvon. Verŝajne tio subkomprenas ke malaperos naciismoj ĉar malaperos nacioj kaj konsekvence naciaj lingvoj, kvankam tion neniu rajtas laŭte formuli. Esperantistoj proklamas daŭre ke la celo estas ke E estu dua lingvo apud la naciaj (kvazaŭ la naciaj estus ununuraj lingvoj kujan la homoj parolas!) kaj agas kaj esperas ke ĝi iĝu la ununura. Tio estas la sama kiel la EU-gvidantaro oficiale proklamas la multlingvecon kiel sian celon kaj praktike agas por unulingva anglalingva EU.



Nu, ĉiukaze, la idelogio kreis la movadon, la diasporan novnacion kiu bone kaj gaje evoluas jam dum 130 jaroj kaj la ĉefmanifestaĵo jara: UK servas antaŭ ĉio ke ĝi konfirmu en ni nian profundan kredon al la interna ideo, al mistiko de Zamenhof-ideoj. Kaj efektive, nur dank' al tiu kredo (sen reala fundamento, ĉar ja historia realo montras ke komuna lingvo ne malhelpas la malpacojn – serbokroata en Jugoslavio, la araba en Proksima Oriento ktp) Esperanto pluekzistas kaj mirinde evoluas.

Sed antaŭ dudeko da jaroj iuj el ni klopodante trovi rolon por Esperanto en Eŭropa Unio, ideala ŝtato kun bezonego trovi komunan lingvon, ekserĉis pli racian kaj por politikistoj pli akcepteblan idearon ol estas la interna ideo de esperantistoj. Evoluis iom post iom alia ideologio pri Esperanto konvena por Eŭropaj celoj. Ĉi tie la bazo de la kredo ne kuŝas en tutmonda packontribuo rekte per lingvo, sed nerekte per fortigo de Eŭropa komuneco kaj sekuriginte EU-estonton, oni povas diri ke oni sekurigis ankaŭ la mondan pacon. Ĉi tie la ĉefan rolon en la ideologio havas la neŭtraleco de Esperanto (cetere ankaŭ unu el la ĉefaj Zamenhof-argumentoj). Novaj scioj klare parolas pri du ĉefaj roloj de lingvo ĝenerale, la komunika kaj la identeca. Ĉiu lingvo estas ankaŭ identigilo por iu grupo kiu ĝin uzas. Pro tio la plej logika solvo por Eŭropa Unio: transpreni la anglan kiel sian nuran laborlingvon ne estas ebla, ĉar nova komunaĵo kia EU ne nur bezonas lingvon kiel komunikilon, sed ankaŭ lingvon kiel identecan identigilon de eŭropanoj. En tiu kazo ĝia komuna laborlingvo kiu iĝos ankaŭ lingvo al kiu eŭropanoj emocie ligiĝos kaj en ĝi kreados sian tuteŭropan kulturon NE POVAS ESTI iu el naciaj lingvoj kiuj jam estas identecaj lingvoj de la koncernaj nacioj. Sekve por tiu rolo Esperanto estus ideala. Sed ankaŭ tio estas, kvankam multe pli logika, ideologio. Neniu povas prui nun ke la identeco Eŭropa ne povas kreiĝi ankaŭ per iu nacia lingvo kiel la angla (ja ekzistas klaraj ekzemploj ke vere tio ne eblas: la rusa en Sovetunio, la

serbkroata en Jugoslavio). Tiu ĉi ideologio eŭropa por Esperanto montriĝis multe pli akceptebla por eŭropaj politikistoj, ĉar ili povas kompreni la problemon de komuna identeco kaj de maljusteco kiun prezentas ne-neŭtrala lingva solvo, dum ili neniel povas akcepti la ideon ke necesas iu nova lingvo por pacigi la mondon, dum ja ekzistas jam la internacia monda lingvo – la angla. Sed la problemo de ĉi tiu dua ideologio estas ke ĝi funkcius nur lige al tuteŭropa ideologio kaj se sekve oni povus propagandi ĝin kiel oficialan starpunkton en EU. Nun la klasikaj esperantistoj ne volas kredi ĝin (ĝi nuligas la idealismon de la zamenhofska filozofio) kaj la grandpotencoj batalas por la intereso de la anglo-unona lingvo. La manko de la nova ideologio estas ke ĝi ne estas totalisma. Ĝi ne parolas pri definitivaj solvoj (fina venko de unu konkreta lingvo kaj definitiva paco kiun ĝi kreas). La solaj fortaj mondaj grupoj (religioj kaj grandnacioj) funkcias baze de totalismaj, dogmaj ideologioj (la religiaj finklarigis la sencon kaj ekeston, la naciaj ideologioj fontantaj en mitologioj pri sankteco de la nacio klarigas la sanktecon de la nacioj, la ekonimipolitikaj totalismoj kiel la kapitalisma sankteco kaj netuŝebleco de la merkato aŭ komunisma fina solvo por egaleco de ĉiuj homoj... Ŝajne la homoj ne povas entuziasmiĝi por ideoj kiuj estas raciaj, kiuj simple ne akceptas ke ekzistas finaj kaj definitivaj klarigoj por kio ajn. La homoj aspiras al kredoj pri kiuj oni ne rajtas dubi.



Pro tio la unua, internidea zamenhofska ideologio ne havas problemon ke ĝi malaperos. Ĝi simple plenumas la aksiomon ke la ideologio devas esti dogma por havi certajn adeptojn, dum la dua havas ŝancon nur se la politik-historiaj cirkonstancoj bone evoluos por ĝi. La problemo kiun esperantistoj nek povas nek volas vidi estas ke per interna ideo kaj Esperanto kreiĝis eta sed nedetruenda novpopoleto, tiu kiu kreas sian propran kulturon kaj serĉas lokon sub la firmamento sed ke ilian ideologion ne dividas la homaro. Esperantistoj volas kredi ke ili estas apartenantoj al iu tuthomara socio, al kiu devus logike aparteni ĉiuj – ĉar ni ja ĉiuj estas homoj. Tamen tio estas grandega memtrompo. Neniu povas ami same forte ĉiujn homojn de la mondo. Oni amas nur tiujn membrojn de tiuj el la grupoj al kiuj oni apartenas, kiuj estas endanĝerigitaj.

Konklude, esperantistoj ne devas timi: ĝia klasika ideologio estas promesanta la totalisman kaj finan solvon kaj tial nepruvebla kaj daŭre alloganta iom da homoj. Malgranda diaspora

popoleto konstruanta interesan kulturon ekzistos eĉ se la mondo definitive akceptos la anglan kiel ununuran oficialan kaj laboran internacian lingvon.

Kaj tiuj kiuj volas esti pli realismaj kaj serĉi malpli dogman klarigon por la demando de eŭropa internacia lingvo, tiuj akceptu la duan ideologion, tiun kiu ne parolas pri definitiva solvo, ne pri absoluta paco kaj ne pri tutmondeco, nur pri tio ke neŭtrala lingvo povus iĝi ne nur komunika sed ankaŭ identeca lingvo de EU kaj tiel grave influi al fortigo de eŭropa konstruaĵo – nur kiel konsekvenco tio povus signifi ankaŭ ke unueca kaj forta Eŭropo ne plu estos fonto de novaj mondmilitoj.

Zlatko Tišljar

LA AGADO DE EEU DUM LA LILLA KONGRESO

Kiel kutime, kiam UK okazas en Eŭropo, EEU organizas siajn jarajn assembleajn kunsidojn dum la UKoj. Tiel okazis ankaŭ ĉi-jare. La 30an de julio ni havis formalan kunsidon de la assembleaj membroj sen publiko, kiu havis laboran karakteron kaj faris leĝajn kaj aliajn decidojn. La kunsidon partoprenis 14 assembleanoj, kio estas pli ol kutime. Ni akceptis la raportojn (pri la agado kaj financan) rilate la jaron 2014 kaj planon por 2015. La plej interesa decido estis pri nova maniero pagi kotizojn al EEU. Pro la gravaj diferencoj de pagkapablo de



unuopaj landoj, estis akceptita la principo pri kvar landokategorioj (voĉdonis 12 adsembleanoj por la decido kaj 2 sin detenis). La kategorioj baziĝas je malneta nacia produkto (MNP) de la unuopaj landoj. La landoj kiuj havis en 2013 malpli ol 11.000

eŭrojn MNP po persono pagas ¼ da eŭro por membro, tiuj kiuj havas inter 11.000 kaj 22.000 pagas duonan eŭron, tiuj inter 22.000 kaj 33.000 eŭrojn ¾ da eŭro kaj tiuj kun pli ol 33.000 pagas 1 eŭron.

La postan tagon (31an de julio) okazis malferma kunveno en kiu partoprenis pli ol 150 kongresanoj. Tie estis prezentitaj la decidoj de la formala kunsido, kaj aparte ĉiuj ĉefaj rezultoj de la agado de EEU dum la pasinta periodo: projekto kaj la paĝaro lingvo.info, agado pri la eŭropa himno, la pola atingo pri Esperanto kiel nacia heredaĵo, planoj por UK en Nitra kaj kelkaj aliaj. Barbara Pietrzak en la komenco transdonis al la Slovaka Esperanto-Asocio la premion Cigno por landa asocio kiu plej efike laboris por la ekstera informado pri Esperanto. En la fino de la kunsido Petro Baláž anoncis la decidon de EEU-estraro proklami Flory Witdoeck kaj Zlatko Tišljar honoraj membroj de EEU.

Dum la unua tago la estraranoj deĵoris ĉe la stando de EEU kadre de Movada Foiro kaj disdonadis informojn, ĉefe pri la nova disko kun Eŭropa Himno kaj pri la UK en Nitra 2016, kie okazos ankaŭ lingvopolitika seminario kiun iniciatis EEU. La sekretario partoprenis ankaŭ en la kunsido de la Komisiono por Eŭropa Agado de UEA.

Maja Tišljarić

48-A ILEI-KONFERENCO EN OOSTENDE (17-25.07.2015)

Kiam dum la UK en Rejkjavik (2013) Mireille Grosjean demandis al mi ĉu ni povus organizi la 48-an ILEI-Konferencon en Oostende, mi tuj jesis. Tamen mi tute ne sciis pri kio mi engaĝiĝis nek kiaj estos la defioj! Reveninte hejmen, mi konsciiĝis ke ne estos bagatelo, kaj do tuj serĉis taŭgajn tranoktadeblecojn. Tiam komenciĝis la problemoj. Neniu amasloĝejo aŭ altlernejo pretis kunlabori; aŭ ili estis jam rezervitaj aŭ ne konvenaj. Sed finfine venis la solvo: oni konstruos novan junulargastejon por anstataŭigi la nunan. Por ne malhavi tiun eblecon mi tuj rezervis la tutan konstruaĵon la 7-an de oktobro 2013 por la konferenco okazonta *iam dum julio 2015*, kaj ricevis la definitivon la 11-an de oktobro! Kompreneble mi mem garantiis ĉiujn financajn devojn.

Kaj la 8-an de februaro 2014, Margaretha Symoens kaj mi fieris ĉeesti la inaŭguron de la Junulargastejo *De Ploate* (ostenda dialekto por *pladijs = platoso*). Jam tre frue konsistiĝis LKK: Marc Cuffez prezidanto (ankaŭ prezidanto de la loka E-grupo *La Konko*), Flory Witdoeck vicprezidantino, kaj membroj: Kristin Tytgat, Margaretha Symoens, Katja Lödör kaj Hans Delnat.

Jam la 24-an de aprilo 2014 Radojica Petrović, sekretario kaj estrarano pri konferencoj vizitis Oostende kaj la ontan konferencon *De Ploate*. Dank al liaj konsiloj kaj stimuloj la LKK sentis apogon en tiu nekutima aranĝo. Feliĉe tiun tagon la suno brilis kaj li povis foti la plej belajn lokojn de nia urbo, kaj tuj aperigi ilin en la venonta IPR-revuo. Radojica profesie gvidis nin en ĉiuj detaloj, kaj ne ŝparis sian helpon en tiu aranĝo. Poste ni vizitis la urbestron de Oostende al kiu Radojica faris imponan impreson! Ni certas ke dank' al li la urbo Oostende decidis doni subvenciojn por la tranoktado de kelkaj konferencanoj.



Tiu tago estis la komenco de bonega kunlaboro inter la LKK kaj la sekretario de ILEI. Tamen Radojica opiniis ke unu vizito certe ne sufiĉos por la organizo de tiu prestiĝa konferenco. Kaj li revenis al Belgio por unue diskuti en Bruselo kun Kristin TYTGAT pri la simpozio dum la konferenco. Vendredon la 17-an de oktobro 2014 Radojica gvidis la LKK-kunvenon en la konferencon por pli bone defini kie kio okazos kaj decidi pri aliaj aferoj kiel afiŝoj kaj sakoj. Daŭre Radojica retumis al ni por aktualigi proponojn kaj decidojn. Sed finfine li

revenis al Oostende la 6-an de junio 2015, do preskaŭ unu monaton antaŭ la konferenco. Li do

ŝparis nek tempon nek laboron por efektiviĝi elstaran eventon. Ni esperis ke jam tiam li havis konfidon en ni por la lastaj finaj laboroj rilate la konferencon. Ĉu ni troigu dirante ke dank' al lia nekutima bona gvidado kaj ĉiama sindediĉo ni finfine povis okazigi unu el la plej bonaj ILEI-konferencoj.

Kaj do vendredon la 17-an de julio, ekde la 10-a matene la LKK deĵoris en *De Ploate*, kaj la unuaj konferencanoj tuj alvenis (kelkaj jam la antaŭan tagon). Katja kaj Hans laboregis por solvi ĉiujn paperajn kaj administrajn problemojn: afiŝojn, kartetojn por diversaj programeroj, nomŝildojn, ktp.; kaj Margaretha baraktis kun ŝiaj diversaj listoj!



Vendredon la 17-an de julio ILEI organizis tradician Frandvesperon: ĉiuj kunportis ion frandeblan el sia lando; estis neimagebla etoso. Do la konferenco komencis gaje kaj amuze!
http://www.nieuwsblad.be/cnt/dmf20150719_01783173?_section=63098581&utm_source=nieuwsblad&utm_medium=newsletter&utm_campaign=regio-nb&M_BT=1931291469373&adh_i=1b40b47a3da662b492bf4cd160e9b506&imai=563851c3-e01d-4937-add5-234aa0ea8f0b

La oficiala inaŭguro okazis sabaton matene la 18-an en la urbodomo de Oostende. La urbestro Jean VANDECASTEELE bonvenigis la konferencanojn substrekante ke Oostende en tiu pinta turista periodo oferas milojn da eblecoj por ferii ĉe la marbordo, kvankam ĝi restas urbo kun ĉiuj urbaj servoj. La prezidantino de ILEI Mireille Grosjean dankis la urbestron esperante fruktodonan konferencon en tiu tiel alloga urbo! Poste Kristin Tytgat, prezidantino de la Konferenca Simpozio, prezentis memorprelegon pri Edward Symoens (https://eo.wikipedia.org/wiki/Edward_Symoens, patro de Margaretha) kiu estis famulo en Esperantio, kaj kiu dum iu periodo loĝis en Oostende). Brilan muzikan intermezon per altsaksofono ludis majstre la nepino de Margaretha Symoens, la 12-jara Nette Wagner.

Alia kutimo estas organizi *Nacian Vesperon*. Kiuj lokaj grupoj aŭ artistoj pretas, je malalta prezo, animi eventon en plena turista sezono? La 18-an de julio ni sukcesis organizi en la plej bela placo de Oostende (antaŭ la granda preĝejo) posttagmezan "Centro-feston de mondaj lingvoj kaj koloroj". Alvenis amasa publiko por admiri 26 diversajn dancojn de fama *Baletlernejo Rose d'Ivry* kaj aŭskulti la muzikon de *Fanfaro de la Fervojo*.

Sed ne nur spektaklo! Mi sukcesis arigi pli ol dek diversajn asociojn por sinprezenti al la loĝantoj de Oostende kaj al la multnombraj turistoj. Inter ili lokaj asocioj de fremddevenaj membroj: el Senegalio, Kongo, Filipinoj, Irano, Kameruno, Dominika Respubliko, Nepalo kaj aliaj. Mi metis nur unu kondiĉon: sinprezentado en propra lingvo kaj skribo, traduko en la nederlandan, kaj mi tradukis esperanten. Tiel ni havis veran centro-feston (ĉar en la centro de Oostende), kaj komparon de diversaj lingvoj kaj koloroj el diversaj kontinentoj! Sed ankaŭ *La Verdaj Skoltoj*, Perloj el Charleroi (Valonio) kaj *Juveloj el Hungario (Katalin)* partoprenis. Estis neforgesebla popola festo. Ankoraŭ nun la ostendanoj demandas ĉu ni organizos tian belegan feston ĉiun jaron!

Pretere: ĉar mi vidis la nomon de Bharat Ghimire en la listo de konferencanoj, mi retumis al li pri la partopreno de nepala grupo en la centro-festo kaj tiel la ostenda grupo gastigis la nepalajn ILEI-anojn dum la konferenco. Bela uzo de Esperanto, ĉu?



Ekde dimanĉo la 19-an komenciĝis la programo de la ILEI-Konferenco http://www.ilei.info/konferenco/2015/Programskizo_Oostende_2015-stato_2015-03-16.pdf http://www.ilei.info/konferenco/2015/2015_48-aKonferenco_ciferoj.pdf

Aparte rimarkinda estis la diservo en la preĝejo de la Kapucenoj. Tute ne atendite la celebranto salutis la ILEI-konferencan kaj mi povis

postlegi la unuan legaĵon kaj la evangelion en Esperanto, kaj plie la orgenisto petis min kanti la *Sanctus de Schubert* en Esperanto. La tre multaj fideluloj aprecis ĉion kaj gratulis min post la servo.

En Oostende la LKK organizis plurajn ekskursojn al diversaj lokoj: la centro de Oostende, Oostende laŭ la Reĝo Leopoldo la II-a (1900 kaj pliaj), la *Atlantik Wall* (mondmilito 1940-1945) kaj ekskursoj al Brugge, Brussel kaj Antwerpen.

La instruistaj trejnseminarioj estis abundaj kaj tre interesaj. Instruis Mireille Grosjean, Zofia Kóródy, Radojica Petrović, Duncan Charters, Katalin Kováts, Elisabeth Ledru. Aliajn prelegojn prezentis Mónica Molnár, Rob Moerbeek, Lee Jungkee, Rosa Ebel, Araksa Elbakjan, Dimitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova, Bart Demeyere, Usui Hiroyuki kaj Peng Zhengming. Ĉiam la aŭskultantoj estis kontentaj pri la diversaj temoj, kaj pri la eblecoj fari demandojn.

Aparte elstara programero estis *La Simpozio*, kiun lerte gvidis Kristin Tytgat (docentino ĉe la VUB, Brusela Universitato) kun la temo *La rolo de lingvoj en konfliktoj*. La ĉefprelego temis pri *Ĉu milito povas esti justa*, far D-ro Réginald Moreels (belga kirurgo, kaj antaŭa prezidanto de *Kuracistoj sen limoj*, antaŭa belga ministro pri Internacia Kunlaboro; nuntempe li regule vizitas konfliktlandojn kie li profesie intervenas en urĝaj sanproblemoj). La aliaj prelegantoj tuŝis similajn problemojn. Profesoro Herman Lodewycks, prezidanto de Internacia Asocio de Profesoroj de Filozofio, substrekis la gravan taskon de UNESKO por enkonduki la filozofian dimension en la ĝeneralan instruadon, nemalhavebla al la formado de konscioj. Heidi Goes nun doktoriĝas pri la mikro-variado en la konga lingvaro; ŝi parolis pri siaj

analizoj. Ariadna Gutierrez prelegis pri la lingva diverseco en Ameriko kaj la tiea alproksimiĝo al la lingvaj politikoj. Mag. Usui Hiroyuki tuŝis la temon Esperanto/Paco. D-ro A. Giridhar Rao dubas pri la promeso de la angla en Barato: edukado kaj socia justeco. D-ro Bengt-Arne Wickström komparas la ekonomian valoron de lingvaj rajtoj al la etikaj valoroj de efikeco kaj justeco. Ekonomikisto Huang Yinbao (Trezo) esperas ke Esperanto havos ŝancon en dialogo de lingvoj inter Ĉinio kaj la mondo.

Tiel finiĝis la 48-a ILEI-Konferenco en Oostende. Kaj tuj poste, la 25-an de julio sabaton matene 2 busoj veturigis la UK-anojn al la 100-a UK en Lille. Ni ne forgesu danki Mireille Grosjean kaj Radojica Petrović pro ilia afabla gvidado dum tiuj 8 tagoj, kaj tutspeciala la deĵorantojn ĉe la akceptejo, kiuj senlace laboregis por helpi la konferencanojn en ĉiuj problemoj: Margaretha Symoens, Katja Lödör, Hans Delnat. Dankegon!

Ĉu tiu konferenco estis sukcesa? La ostenda LKK esperas ke jes. Ni nur aŭdis laŭdojn pri la urbo, la junulargastejo, la vetero, kaj ĉefe pri la diversaj aranĝoj ĉu instruaj ĉu distraj.



Dum tiu konferenco EEU prezentis definitivan version de la DVD pri la Eŭropa Himno + bildoj kaj melodioj de la himnoj de la 28 EU-landoj. Ĉiuj ĝoje salutis la iniciaton kun granda aplaŭdo. Kaj pluraj tuj aĉetis la DVD-n celante uzi ĝin kiel reklamilo ĉe korusoj kaj asocioj.

Tiu DVD kostis kaj monon kaj paciencon: la filmado okazis pere de profesia filmisto. Sed ne tuj korusoj akceptis kunlabori en tiu agado. Do restis nur la solvo por alvoki ĉiujn apartajn gekantistojn. Imagu ke kiam oni organizis ripetadesiojn nur venis 10 aŭ 12 kantistoj. Por la filmado mi lasis la decidon al la filmisto Johan Claeys, kiu elektis malnovan preĝejon en la rando de Oostende, kie tutapude estas la

tombejo de James Ensor, fama ostenda pentristo. https://nl.wikipedia.org/wiki/James_Ensor

Mi preskaŭ malesperis! Tamen miraklo: je la fiksita dato por filmado, aperis 40 gekantistoj (kelkajn mi eĉ antaŭe neniam renkontis!). Sed DVD kun nur unu kanto? Mi opiniis ke tio ne sufiĉas. Kial ne aldoni ion pli pri la EU-landoj? Facile dirite, malfacile farite! Ni tuj konstatis ke ne indas serĉi belajn bildojn en la reto; multaj restas sub kopirajtoj! Prezertinte la unuajn provojn dum iu E-renkontiĝo mi spertis ke multaj homoj ne ŝatis la bildojn de sia lando! Mi do rekomencis la alvokon al bildoj kaj finfine decidis finpretigi la lastajn rezultojn. Do tia ĝi estas nun!

Flory Witdoeck

LA ALIAJ NE ESTAS STRANGAJ KAJ MI NE ESTAS NORMALA (IMPRESOJ OKAZE DE SES 2015)

Dum la lastaj dudekkvar jaroj de mia vivo mi trairis diversajn periodojn, kaj kiam mi forlasis lernejon kun la scio, ke komenciĝas mia vivo de ordinara plenkreskulo, mi akceptis mian sorton de malrapide blindiĝanta informadkisto. Ie en mia subkonscio tamen silente dormetis la espero, ke eble mi mian tutan surteran vivon ne pasigos per tuttaga sidado en la oficejo. Verdire, tiu imago de ĉiutaga rutino timigadis min.



Kiam miaj someraj planoj subite disfalis, mi dum iom da tempo batalis kun LA propra egoo, provadis postlasi la triston, malkontenton kaj propran intereson. Mi bezonis ion, pri kio mi povus tuj entusiasmiĝi, simple ion, kio anstataŭigus en mia kapo la malagrablajn sentojn pri la proksimiĝanta somero, kiu plej supozinde devintus iĝi la plej enua en la lasta kvaroncentjaro. La ideo komuniki kun homoj sen iaj ajn

baroj tra la tuta mondo fascinis min jam antaŭ longe. Unu baro, la distanco, estis superita jam antaŭ longe. Restis nur la lingva problemo, kies solvo estis proponita longe antaŭ ni. Unu lingvo por ĉiuj – jes, estas Esperanto. Mi sciis pri ĝi jam antaŭ longe, sed mi neniam igis min provi ĝin kompreni. La interreto estas senfina, kaj mi kredis, ke ĝi ofertas al mi eblecon de ŝanĝo, sencohava tempopasigo ekster laborejo, dum ferioj. Mi ne memoras kion precize mi serĉis kaj kion mi sekvis, sed mi malkovris unu baldaŭ okazontan aranĝon, kiu devintus esti proksime de mi, kun homoj de la tuta mondo, ofertante la eblecon akiri la konon de Esperanto. Mi ne sciis kion atendi, mi nur sciis ke mi irus sole. Kaj mi sciis ke devas esti tiel, kaj ke la aliĝilo estos plenigita ene de dekoj de sekundoj, kaj ekde la unua sekundo mi sentis ke mi trovis. Mi aliris la aferon tiel, ke mi lernos ion novan, eble mi kun iu babilos, kaj se mi enuos, mi iros hejmen bierumi kun amikoj.



Mi gigante eraris. La Somera Esperanto Studado – SES 2015 en Martin, estis tutcerte la plej bone pasigita semajno en mia vivo (11-19.07 kun 190 partoprenintoj). Sonas kvazaŭ eltondita el septembra lerneja verkaĵo pri la lasta ferio. Estu tiel. Post kiam grupeto de homoj helpis al mi superi miajn introvertulajn komunikajn barierojn, nekredbla kvanto

de aferoj ekokazis. Mi neniam antaŭe trovis min en tiel inspira medio. Mi neniam komprenis

pasion de kelkaj homoj pri trovado de novaj konatuloj, ĉefe dum tiaj ĉi aranĝoj. Ja kiel utilas al mi amiko por unu semajno? Dio mia, mi meritis vangofrapon. Kaj ne nur unu. Oni diras ke kio okazas en Esperantujo, restas en Esperantujo, pro tio mi faru nur etan resumon, kaj mi komencu per la malplej grava fakto.



Mi lernis iom da Esperanto. Strange, ĉu ne? Kaj mi prenis ĝin kiel prioritaton, kiel celon. Nu, estas nur ilo. Ĉirkaŭ Esperanto ekzistas mojosa komunumo. Komunumo de homoj el diversaj medioj, kun diversaj spertoj, travivaĵoj, kiu verŝajne movis min antaŭen en mia vivo pli ol se mi legus tutan bibliotekon plenan je verkoj de ĉiuj diversaj ĝenroj. Tion ĉi verkas la vivo mem. Malfermiĝis miaj okuloj, mi laboras pri tio ke la okulfermoj forbrulu en pasinteco, mi komprenis ke en a mondo sen antaŭjuĝoj estas io, al kio devus ĉiuj kontribui, mi konsciiĝis ke eĉ se laŭ la identigilo mi ne plu junas, mi daŭre junas ĝuste tiom kiom mi volas, kaj plej grave – tiel kiel mi stulte al multaj junuloj enviis iliajn eblecojn, mia pordo nun malfermiĝis kaj la tempo de juneco komenciĝis ĝuste nun! Iom da ordinaraj vortoj fine. Mi volas doni al Esperantujo tion, kion ĝi jam sukcesis oferti al mi ene de tiuj kelkaj tagoj. Mi antaŭĝojas la kunlaboron kun la Slovaka Esperanta Junularo (SKEJ), mi ĝojas ke esperantistaj okazaĵoj estas ĉie en la mondo, kaj estas granda ŝanco, ke la homojn kiujn mi nun renkontis, mi baldaŭ


renkontos denove. Mi kredas ke kiel muzikisto mi povos iomete kontribui al la programo de la venontjara kongreso. Cetere, la Universala Kongreso en Slovakujo. Mojose, ĉu ne? Tamen ekzistas du aferoj kiujn mi ŝanĝus. Estus bonege, se ne ekzistus la postkongresa sindromo de esperantistoj, ĝi vere dolorigas. Kaj oni devus ion fari pri la tempo de matenmanĝoj, estas neeble trafi ilin.

Peter Drábik

FINE KREITA BAZA VORTLISTO POR KOMENCANTAJ KURSOJ

En 1979 dum la UK en Luzerno mi surbendigis sur kasetilo simplajn diskutojn kaj interparolojn de kongresanoj kaj tiel kolektis korpuson de parolata Esperanto de 60.000 vortoj. Mi tiutempe preparis diplomlaboraĵon por mia studo en Zagreba Universitato pri morfemofteco de parolata Esperanto. Poste mi transskribis iom malpli ol duonon de tiu materialo (24.600 vortojn) dividante la morfemojn per streketoj per komputilo kiu nombris la morfemojn. La rezulto estis tri frekvenlistoj (tiu de morfemoj, tiu de vortoj kaj de elektitaj idiomaĵoj). Ĉiuj tri listoj je du versioj: laŭofteca listo kaj laŭalfabeta listo. La morfemofteco de parolata Esperanto aperis libroforme en 1982. Jam en 1980 la kvaropa grupo en Zagrebo (Štimec, Špoljarec, Imbert, Tišljarić) komencis ellabori porkomencantan lernolibron kiu baziĝis je tiu esploro. Ĝi surprize montris ke 467 plej oftaj morfemoj kovras 95% de la tuta korpuso kaj sekve tiuj proksimume 500 morfemoj iĝis la materialo por la lernolibro. Aperis la tiel nomata Zagrebmetoda lernolibro kiu estis evoluigata dum sekvaj 5 jaroj kaj fine ekde 1985 la

aŭtoroj opinis la lernolibron bona por internacia uzo. Ekde tiam baldaŭ aperis aro da diverslingvaj adaptotaj kaj ĝis 2015 aperis adaptotaj al pli ol 40 lingvoj.



La esenco de tiu metodo estas ke ĝi estas metodo kiu adaptiĝis al la specifeco je Esperanto kaj pedagogie ne kopiis iun ajn el nacilingvaj metodoj. Esperanto havas apartan gramatikan strukturon kiu ebligas ke per tre malmultaj bazaj morfemoj (vortoj

kaj gramatikaĵoj) eblas konstrui amasegon da vortoj kaj porkomencantaj lerniloj devus instrui nur tiun plej oftan morfemaron kaj ekzercigi la lernantojn el ĝi krei aliajn novajn vortojn kaj la frazkonstruadon. Tion kutime aliaj lerniloj ne konsideras kaj grave malplifaciligas la lernadon plej ofte kopiante la lernolibrojn de naciaj fremdlingvoj.

Bedaŭrinde mia esploro ne povis esti konfirmita de aliaj esploroj ĉar neniu plu esploris la oftecon de morfemoj kaj des mapli la oftecon de parolata Esperanto-korpuso. 33 jarojn poste, do ĉi-jare, sinjoro Raymond Gerard el Belgio kreis programaron kiu kapablas tre kontentige dispartigi E-vortojn en tekstoj al morfemoj kaj nombri ne vortojn sed morfemojn. Tiu ĉi fakto ebligis ĉi-jare kompari miajn rezultojn de 1982 kun la rezultoj de identmaniera nombado de morfemoj en skribitaj tekstoj. Ankoraŭ oni ne havas parolatajn tekstojn kiujn la komputilo povus aŭtomate transformi al skribita teksto kaj poste dismembrigi al morfemoj. Tamen tiu ĉi programaro ebligis fine kompari diversajn skribitajn tekstojn kun la miaj. Mi interkonsentis kun sinjoro Gerard ke li elektu tekstojn proksimume similgrandajn (inter 25.000 kaj 45.000 vortoj) de laŭeble teme averaĝa teksto (ne tro faka). Li elektis korpusojn el revuo Kontakto, La Juna Amiko, Monato kaj el la libro La Eta Princo. Per sia programaro li kreis 4 frekvencmorfemarojn kiujn ni komparis kun mia listo je nivelo de 600 plej oftaj morfemoj kiuj kovris en ĉiuj 5 listoj inter 92 kaj 97% de la korpusoj. Ni serĉis kiuj morfemoj inter tiuj 600 troviĝas en minimume 4 listoj kaj trovis ke temas pri 398 morfemoj kiuj sendube nun ofirmiĝis kiel morfemoj plej ofte uzataj en Esperanto. Mi mem decidis aldoni 57 pliajn morfemojn el mia listo pro specifeco de parola lingvaĵo (kiuj havis en mia listo altan oftecon kaj ne troviĝis inter la 600 en aliaj listoj (ekz. tagoj de semajno aŭ nombroj post 5 ktp) kaj tiel ni kreis BAZAN LISTON kiu devas esti instruata en ĉiu komencanta lernolibro, sed laŭeble kun minimumo da pliaj vortoj kiuj por komencantoj estas balasto kaj postulas gravan plian penon lerni vortojn ne nepre necesajn por la ĉiutagaj bezonoj.

Nur kiam iu kreas la eblon analizi parolatan lingvaĵon aŭtomate, oni povos kompari mian liston kun samtipa korpuso kaj eventuale iomete korekteti la BAZAN LISTON. Sed la esploroj faritaj kun sinjoro Gerard ebligis krei fidindan BAZAN LISTON.

Tio devus influi kreantojn de novaj lernolibroj tiel ke ĉiuj laŭeble klopodu uzi la liston kun laŭeble minimuma aldono de pliaj vortoj, kiuj ja tamen necesas pro pedagogiaj kaŭzoj ke la ekzercotekstoj estu interesaj kaj amuzaj. Ideala lernolibro estus tiu kiu enhavus nenion pli krom la bazan liston, ĉar ĝi ebligus lernadon de komenca Esperanto laŭ la plej efika kaj

sendube plej rapida maniero. Tia lernolibro kun 450 morfemoj estas lernenbla dum kelkdeko da lernohoroj kaj ebligas maksimuman kombineblecon kreadi sennombon da frazoj kun kelkmilo da vortoj.

Esperanton ja eblas lerni per kiu ajn lernolibro kiel ja okazis ĉiam ĝis nun, sed ju pli la lernolibro estas for de ĉi tiuj 450 morfemoj (ne enhavas multajn el ili kaj enhavas multajn aliajn) des pli da lernoklopedoj ĝi postulas de la lernantoj.

Jen la baza listo:

a ad afer ag ajn akcept aktiv akv al ali almenaŭ alt am amas amik an ankaŭ ankoraŭ anstataŭ ant antaŭ apart aper ar aranĝ art as aspekt at atend atent ating aĉ aĉet aĵ aŭ aŭd aŭskult baldaŭ bedaŭr bel bezon bon cel cent centr cert ĉambr ĉar ĉe ĉef ĉi ĉiam ĉirkaŭ ĉiu ĉu da dank daŭr de decid dek dekstr demand dev dezir dimanĉ dir dis divers do dom don dorm du dum e ebl ec edz eg ej ek ekskurs ekster ekzempl ekzist el elekt em en er esper est estr et eĉ eŭrop facil fakt fal famili far fart feliĉ ferm fin flank foj for forges form fort frat fru funkci gajn ge german grand grav grup gvid ĝeneral ĝi ĝis ĝoj ĝust halt hav hejm help hieraŭ histori hodiaŭ hom hor i ia iam ide ie ig il ili imag in ind infan inform instru int inter interes io iom ir is ist it ital iu iĝ j ja jam jar je jen jes jun juĝ jaŭd kaj kant kap kapabl kapt kar kaŝ ke kelk kia kial kiam kie kiel kies kio kiom kiu klar komenc kompren komput kon koncern konsent konsist kontraŭ korp kost kovr kred kresk krom kuir kultur kun kur kutim kvankam kvar kvazaŭ kvin la labor land las last laŭ leg lern leter li liber libr lig lingv lok long loĝ lud lum lund mal man manier mank manĝ mar mard maten mem memor merkred met mez mi mil milion minut mir mon monat mond montr morgaŭ mort mov mult n naci nask naŭ ne neces nek ni nokt nom nov nu numer nun nur o oft ok okaz okcident okul okup ol on oni ont opini ordinar organiz os pag pardon parol part pas patr paŝ pens per perd person pet pied plan plaĉ plej plen pli plor plu plur por port post postul pov poŝ pren preskaŭ pret prezent prezid pri pro problem produkt profesi proksim propon propr prov publik pur radi rajt rakont rapid raport re reg regul renkont respond rest ret ret ricev rid rigard rilat rimark riĉ romp sabat salut sam san sat saĝ sci scienc se sed sekv semajn sen send sent sep serĉ ses si sid signif silent simil simpl sinjor sistem skrib sol spert star strat sub sufiĉ sukces super supr sur ŝajn ŝanĝ ŝat ŝi ŝir tabl tag tamen tekst tem temp ten tia tial tiam tie tiel tim tio tiom tiu tra trans tre tri trink tro trov tuj tut u uj ul um universitat unu urb us uson util uz valor varm vast ven vend vendred ver verk vesper veter vetur vi vid vir viv vizit voj vojaĝ vol vort voĉ zorg

Pli detale pri la esploro eblas legi ĉe: <http://www.ipernity.com/blog/pajo.zlatko/1582384>

Zlatko Tišljariĉ

PROFESIECA FILMO PRI SVITAVY

La Esperanto-Muzeo kaj ĉeĥaj esperantistoj kreis spektindan filmeton pri la urbo Svitavy: Svitavy - malferma kaj movoplana urbo. Temas pri nuna sidejo de E-movado de Ĉeĥio kaj certe vizitinda. Vi povas spekti ĝin ĉi tie:

<https://youtu.be/UOIRcEvIdOs>

Miguel Gutiérrez Adúriz

RUMANA ESPERANTO-KONGRESO BALDAŬ

La Asocio de Esperanto de Rumanio, kune kun la Okcidenta Universitato de Timisoara kaj la Kulturdomo de Timisoara organizas la Tutlandan E-Kongreson inter la 4a kaj la 6a de septembro 2015 en Timisoara.

Provizora programo:

1. kongreso: analizo de la stato de la asocio, klarigoj, strategio, elekto de nova estraro
2. simpozio: *Peresperanta kultura itinero*
3. konversacia rondo
4. prelego *Kial esperanto?* kaj kurso por komencantoj (por neesperantista publiko)
5. traurba rigardado kun esperanta ĉiĉerono
6. vizito de la arkitekturaj vidindaĵoj de la Piaristoj
7. vizito de la bierfabriko Timisoreana
8. prezentado de la jubilea jaro 2014 en Montevideo (en 1954 la Ĝenerala Konferenco de UNESCO akceptis la unuan Rezolucion pri Esperanto)
9. prezentado de la 99-a Universala Kongreso en Bonaero
10. prezentado de la 100-Universala Kongreso en Lilo
11. kultura programo

Aliĝu al aŭra.bute@gmail.com

Aurora Bute

15-A POLITIKA DISKUTO PRI INTERNACIA DEMOKRATA LINGVO EN EU

Okazis inter la 26-a kaj 28-a de junio en Alsooers (Hungario). Ekde la komenco de 21a jarcento okazas diskutoj pri politikaj aspektoj de Esperanto.

La unuan, en majo 2000, organizis la Munkena Esperanto-klubo, kun la intenco vigligi esperantistojn por politika pensado kaj agado. Sekve, la Munkena grupeto decidis fondi politikan partion en Germanio kaj komencis prilabori statuton kaj bazan programon. En 2003 fondis la francaj esperantistoj kun similaj intencoj la politikan partion „Europo Demokratio Esperanto“ (EDE). La Munkena grupo baldaŭ decidis, ke ĝi aliĝas al Franca EDE. Ekestis



ankaŭ la EDE-DE (en Germanio) kaj federacio por politika movado pri internacie demokrata lingvo en EU. Post 2 jaroj aliĝis ankaŭ la Hungaroj al la Federacio, EDE-HU kaj post 3 jaroj la

poloj, EDE-PL. El aliaj EU landoj kunlaboris kelkaj individuoj kun la intenco venonte fondi EDE en la propra lando. La Francoj partoprenis la EU-parlamentajn balotojn 2004, 2009 kaj 2014. La Germanoj partoprenis la EU balotojn 2009. En 2014 ili ne atingis la necesajn subskribojn.

Ĝis nun la plej gravan sukceson per EDE por Esperanto, atingis la Pola EDE. En 2014 en Pollanda Ministerio estis akceptata la propono, prezentita de EDE-PL, enskribi la lingvon Esperanto sur la liston de la Pola nemateria kulturheredaĵo. La prilaboro kaj iniciato de la propono devenas de Kazimierz Krzyzak, Edward Kozyra, Stanislaw Rynduch kaj Antoni Walaszek, partoprenintoj en la diskutoj en Alsooers, en la jaroj, 2011, 2012 kaj 2013.

Nun, la ĉefa temo de tiu kunveno estis, ke ni priparolis kun 15 partoprenantoj la eblecojn pri la ekzemplo de la Pola EDE, postfari ankaŭ en aliaj landoj la proponon: „Esperanton enskribi kiel kulturheredaĵo en la respektiva lando.“ Unue, la agantoj devas esplori, ĉu ekzistas, aŭ kiu institucio ekzistas kiu okupiĝas kun la kulturheredaĵoj de la lando. Komence per EDE ni devas limigi nian serĉon en la Europa Unio, sed estas ankaŭ dezirende mondvasse agi, ĉar Esperanto apartenas al la monda kulturo.

En ĉiu EU-lando ekzistas en grandaj urboj oficeoj de deputitoj de la Europa Parlamento. Tie alprenu kontakton, pridiskutu kaj proponu la samon, kion la Poloj jam ekzemplece faris. Proponi organizi grupeton da parlamentanoj kiuj subtenas la internacian kulturon kaj sekve Esperanton. Estus konkreta tasko de EDE-anoj en diversaj landoj. Blazio Vacha menciis, ke li jam antaŭ kelkaj jaroj vizitis eŭropdeputitan parlamentanon en Budapesto, kaj informiĝis pri kelkaj aferoj. Sed poste nenio okazis kaj la iniciato estis forgesita. Li promesis denove aktualigi lian komencon kaj kunlabori en la kontaktigo de deputitoj kaj politikistoj.

De la Polaj iniciantoj ni ricevis la konsilon, neniam ĉesi la provon diversflanke atingi la celon. Persiste resti malantaŭ la afero diris Kazimiro Krzyzak, kiu atingis multe da spertojn tiurilate. Pluiri ankaŭ post iuj malsukcesoj. En Pollando ekz. Varsovio kaj eĉ Bjalistoko rifuzis subteni la iniciaton de Pola EDE. Tamen ili atingis la celon kun pliaj aliaj urboj kaj provincoj.

Stefano Mac Gill, vicprezidanto de UEA, faris koncizan laborplanon por EDE-HU. Antaŭ du jaroj la prezidanto de EDE-HU vizitis la UNESKO-Komisionon en Hungario. Tiu citis kaj agnoskis la rezoluciojn de 1954 kaj 1985, sed diris, ke faris nenion konkretan por sekvi la rekomendojn, ĉar en dek jaroj ne venis proponoj, nek informpetoj. Sekve de lia interveno pri la strategio por EDE-HU, mi skizis por EDE-HU laborplanon, kiun mi proponas:

1. Kreu konkretajn proponojn por la Komisiono – eĉ modestajn – kiuj kongruu kun la prioritatoj de la Komisiono.
2. Subtene al formulo de vivipovaj proponoj, akiru helpe de UEA spertojn el aliaj landoj.
3. Zorgu, ke ekde nun la Komisiono havu regulan kontaktadon flanke de EDE-HU, HEA, HEJ, KEA ks.
4. Establu kontaktojn kun fakoj kaj oficistoj ene de la Kultura Ministerio.
5. Anonco de Hungario kiel lando kun rilatoj kun Unesko-Komisiono, kaj nomumigo de reprezentanto en la (starigota) internacia laborgrupo ĉe UEA pri landnivela agado ĉe Unesko.

Post realigo de tiuj antaŭkondiĉoj, eblas aliri la ideon, ke Hungario proponu la lingvon Esperanto por enlistigo en la Internacia Listo de Parolaj kaj Nemateriaj Heredaĵoj de la Homaro. Unua paŝo estas ekscii, ĉu Hungario subskribis la Konvencion el 2003. Se ne ĝi rezignu pri la tuja projekto, kaj eluzu la starigitajn kontaktojn aliciele.

Eugeno Macko, vicprezidanto de EDE-Federacio, esprimis la opinion, ke la t.n. centraj eŭropaj ŝtatoj devus esti en pliaj kontaktoj por meti Esperanton kiel internacia kulturheredaĵo apud iliaj naciaj heredaĵoj. Ĉar unue, la popoloj en la iama Habsburgmonarkio havis multe da pozitivaj spertoj por la kunvivado de diversaj popoloj unu kun la alia, kio okazis kelkcentjarojn en la historio kaj tio povus utili atingi la celon.

Se iu ŝtato oficiale agnoskas Esperanton aldonante ĝin al sia kulturheredaĵo samtempe signifas sian deĝon de troa naciismo.

Eŭgeno Macko

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de aŭgusto 2015

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Flory Witdoeckt, Eŭgeno Macko, Miguel Gutiérrez Adúriz
Aŭrora Bute, Peter Drábik, Maja Tišljár, Zlatko Tišljár

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

